

La 10an de januaro 2016

## Festo de maturiĝo en Fukuŝima

La 10an kaj la 11an de januaro en multaj urboj oni okazigis la Feston de maturiĝo, invitante gejunulojn, kiuj fariĝis/os 20-jaraj inter aprilo 2015 kaj marto 2016.

### Festo en la urbo Naraha



En la urbo Naraha de la gubernio Fukuŝima 73 el la 88 invititaj gejunuloj kolektiĝis kaj festis sian maturiĝon. Unuan fojon ekde la Katastrofo okazis la Festo en ilia propra urbo. La loĝantoj de la urbo Naraha ne rajtis loĝi en sia urbo pro densa radioaktiveco ekde la nuklea akcidento en marto 2011 ĝis la lasta semptembro. Nun ili rajtas loĝi, sed nur 421 el 7363 loĝantoj loĝas en la urbo (lastaj donitaĵoj: 978 loĝantoj).

En multaj lokoj en la urbo ankoraŭ estas poluite, do junaj gepatroj kun infanoj ne volas reveni. Krome multaj jam havas novan vivon ekstere kaj iliaj infanoj adaptiĝintaj al

nova lernejo, ne volas transferiĝi. Do certe plejparto de la gejunuloj, kiuj ĉeestis en la Festo, venis de ekstere por la Festo.

La urboj, en kiuj la loĝantoj ne rajtas loĝi, okazigis sian Feston en aliaj urboj: La urbo Ookuma okazigis la Feston en la urbo Iŭaki, la vilaĝo Iitate en la urbo Fukuŝima, la urbo Namie en la urbo Nihonmacu kaj la urbo Tomioka en la urbo Koorijama.

## **Vortoj de du junulinoj**

S-ino Mijake Ŝiori el Naraha: Mi loĝis en la loĝejo de Asocio de Japana Piedpilko en Naraha kaj trejniis min por fariĝi piedpilkisto. Kiam okazis la Katastrofo, ni ĵus finis la kursfinan ceremonion de mezlernejo. Mi volis ludi kun miaj amikoj posttagmeze, sed pro la Katastrofo mi ne povis reveni hejmen kaj tranoktis en aŭtomobilo. En la sekva tago okazis la nuklea akcidento. Ni fuĝis al mia hejmo en la norda insulo Hokajdo. Se ne okazintus la nuklea akcidento, mi povintus resti en Naraha. Nun mi ludas en la piedpilka klubo en la urbo Koobe. Mia revo estas ludi piedpilkon kiel membro de la japana teamo.

F-ino Tanaka Ajumi el Namie: Mi estis tre maltrankvila, kiam mi disiĝis de miaj amikoj pro la nuklea akcidento, sed subtenate de multaj ĉirkaŭaj homoj, mi povis eniri en superan mezlernejon kaj poste en universitaton. Kiam mi rifuĝis, mi rimarkis, ke manĝaĵoj estas tre valoraj kaj mi komencis dankante manĝi. Mi volas fariĝi instruisto de dommastrumado en mezlernejo. Iam mi volas reveni hejmen por kontribui al la restariĝo de mia urbo.

## **Malmultiĝis loĝantoj en la damaĝitaj urboj**

La 28an de decembro 2015 la gubernioj Iŭate, Mijagi kaj Fukuŝima publikigis statistikon pri la nombro de loĝantoj en la urboj laŭ la pacifika oceano ĝis la 4a de oktobro. Jene malmultiĝis loĝantoj en la respektivaj urboj:

La gubernio Iŭate: minus 3,6%

La urbo Oocuĉi: minus 23,5%

La urbo Rikuzen-Takata: minus 15,2%

La urbo Jamada: minus 15,0%

La gubernio Mijagi: minus 0,6%

La urbo Onagaŭa: minus 37,0%

La urbo Minami-Sanriku: minus 29,0%

La urbo Jamamoto: minus 26,3%

La respondeculo de la gubernio timas, ke en la statistiko de 2020, la nombro de la loĝantoj draste malmultiĝos, ĉar pli kaj pli da laboristoj, kiuj provizore okupiĝas pri la laboro de rekonstruado en tri gubernioj, forlasos.

Ankaŭ en la gubernio Fukuŝima malmultiĝis loĝantoj:

La gubernio Fukuŝima: minus 5,7%

En la urboj loĝeblaj jene malmultiĝis la loĝantoj:

La urbo Naraha: minus 87,3%

La urbo Kaŭauĉi: minus 28,3%

La urbo Hirono: minus 20,2%

Al tiuj urboj loĝantoj ne povas reveni pro manko de vivoportuneco kaj pro timo de radioaktiveco.

En la urboj ne loĝeblaj pro radioaktiveco la nombro de loĝantoj estas:

Ookuma: 0

Futaba: 0

Tomioka: 0

Namie: 0

Kacurao: 18

Iitate: 41

## **Mortoj rilatantaj al la nuklea akcidento superis 2000 en**

### **Fukuŝima**

La 28an de decembro la gubernio Fukuŝima publikigis, ke la mortoj rilatantaj al la Katastrofo (en efektiveco ĉefe al la nuklea akcidento) superis 2000. En la gubernio Fukuŝima 101 000 homoj ankoraŭ rifuĝinte vivas en kaj ekster la gubernio. Ili suferas pro malfacilaj vivkondiĉoj kaj pro malespero, kio akcelas morton. Laŭ la statistiko de la registaro rilatantaj mortoj en Iŭate estas 455 kaj en Mijagi 918, do Fukuŝima elstaras. En Fukuŝima entute 3835 homoj mortis pro la Katastrofo, el kiuj 2007 mortis post la Katastrofo dum rifuĝado kaj posta vivo.

## **La elektraj kompanioj volas refunkciigi pli multajn nukleajn**

### **reaktorojn**

Jam en la lasta jaro ekfunkciis du reaktoroj n-ro 1 kaj 2 en la nuklea centralo Sendai en la suda insulo Kjuuŝuu. La 29an de januaro 2016 Kansaja Elektra Kompanio ekfunkciigis la reaktoron n-ro 3 de la nuklea centralo Takahama en la gubernio Fukui. Tiu reaktoro uzas mox-brulaĵojn, do ĝi estas pli danĝera. La Elektra kompanio Ŝikoku planas funkciigi la 3an reaktoron de la nuklea centralo Ikata en aprilo.

Ekde aprilo finiĝos monopolo de 9 elektraj kompanioj pri vendo de elektro, sekve eniros en tiun kampon novaj kompanioj kun malalta prezo, pro kio la elektraj kompanioj volas malaltigi la prezon, produktante elektron ŝajne malmultekoste per nukleaj reaktoroj.

Ankaŭ la Elektra kompanio Ĉuubu volas funkciigi la reaktoron en Hamaoka en la gubernio Ŝizuoka. Tiu centralo situas en la urbo Omaezaki, sub kiu Filipina plato kaj Nord-amerika plato kolizias. Tuj post la tertremo



en 2011, la tiam ĉefministro haltigis la funkciigon de la reaktoro tie, ĉar ĝia situo estas tro danĝera, sed la nuna registaro agnoskas la funkciigon kondiĉe, ke la kompanio konstruos suffice grandan digon kontraŭ okazontaj grandaj cunamoj.

La 26an de decembro tiu digo finkonstruiĝis. Ĝi estas 22 metrojn alta kaj 2,2 kilometrojn longa. En septembro 2016 la tuta preparo por funkciigo de la reaktoro n-ro 4 finiĝos kaj en septemfo 2017 tiu de la reaktoro n-ro 3 finiĝos.

Vidu la foton. Eĉ se la digo povos rezisti kontraŭ cunamoj, la funkcioj de la reaktoroj povos difektiĝi pro la tertremego, kiu kaŭzos la cunamegojn. Nukleaj reaktoroj konsistas el multaj longegaj tuboj. Se tiuj estos difektitaj, granda katastrofo okazos. Eble la nuklea centralo Hamaoka estas la plej danĝera el ĉiuj centraloj en la mondo. Kial la registaro aprobas ĝian funkciigon? Ankoraŭ ĝi kredas sekurecon de nuklea energio samkiel antaŭ la katastrofo en Fukuŝima. Al ĝi estas pli grava ekonomio, ol vivo de la popolanoj. Tamen kiam okazos granda akcidento, kaj ekonomio kaj vivo perdiĝos.